


TURANO 35 U K O



3^a trimestro 2014

En tiu numero
vi legos..

Hélène Ales- sandro montr la vojon : unue lerni esperan- ton, poste uzi ĝin dum ekster- landaj renkon- toj.	p.1 ĝis p.5
Franca Cipriani haltis antaŭ la sonorilo de la Paco.	p.5 p.6
J-J Moreau daŭrigas sian tendeman voja- ĝon en Irlando.	p. 6 p. 7
Jeanne kaj Gérard Layse- man tradukis interesajn ga- zetajn artikolojn.	p. 7 kaj p. 8
Solvo de la kru- cenigmo propo- nita de Béren- gère Turbillon en la T.L. 34.	p. 8

TAGLIBRO DE NOVA SES-ANINO

De kiam mi eklernis esperanton per la ret-paĝaro "www.lernu.net" mi deziras partopreni en la « Somera Esperanta Studado », t.



n. SES. Ĉijare, mi eksaltis : Februare mi aliĝis kaj zorgis pri la vojaĝo sed, poste, mi metis la tuton en etan kaŝitan lokon de mia cerbo kaj forgesis ĝin.


Mi vekigis nur du semajnojn antaŭ la foriro kaj freneze ekrestudis... la anglan, ĉar antaŭ ol alveni en Esperantujon, mi, tute nesperta kompatinda vojaĝonto, devos tutsole flugi al Vieno per aviadilo, trovi la buson al Bratislavo kaj piediri, eble nokte, ĝis la hotelo.

Finfine, jen la tago "T", la 11-an de Julio. Fakte mi tre bonŝancas : la vojaĝo tute glatas kaj mi enhoteliĝas je la 21-a. Uf !!!

La 12-an de Julio.

Mi planis akceptiĝi en la SES-eron, kiu staras en Nitra (80 km de Bratislavo), nur dum la postagmezo. Sekve, mi havas

tempon por iomete viziti piede la historian centron de Bratislavo. Fakte, tiu ne estas tre granda ĉefurbo (415 600 loĝantoj) ; mi ĝuas la trankvilecon kaj la verdlokojn. Sed, en tiu frua mateno, mi vidas plurajn senhejmulojn, kiuj dormas sur benkoj. Mi alsupras al la kastelo, ties stilo, tro kvadrata, ne tre plaĉas al mi. Tamen, de tie la vidpunkto je Danubo kaj la urbo estas bela.



Mi pluvagadas tra la senveturilaj stratoj ; mi rimarkas muzeon pri horloĝoj sed ĝi malfermiĝos tro malfrue, mi provos viziti ĝin la venontan sabaton, kiam mi estos rehejmenigonta. Mi ankoraŭ miras antaŭ blua preĝejo, kiu ŝajnas farita el sukero.



Nun, eku ĝis la busostacio ! Ĝuste, buso al Nitra tuj foriros. Kelkal homoj ĉirkaŭas la ŝoforon, kiu enbusigas valizojn. Mi demandas al li

« Nitra ? » Kaj tuj ektorniĝas al mi junulo kun dorsosako : « SES ? »

Ni konatiĝas dum la veturo. Li estas Ĉeĥo, li dufoje jam partoprenis la aranĝon kaj lia ĉefa celo estas renkonti geamikojn (prefere knabinojn kompreneble !)

Elbusiĝo : nun, kiel iri al la SES-ejo ? Ĉu buse, ĉu piede ? Alia SES-ano, kiu ĵus alvenis, diras, ke necesas nur dek minutoj de paŝado. Do, eku ! Miaj du gvidantoj bone sekvas siajn poŝtelefonojn kaj ni bone alvenas... duonon da horo poste ! Post la akcepto, mi finfine povas iomete ripozi en la dormoĉambro, kiun mi okupos kun alia loĝantino, ne ankoraŭ ĉi-tie. Kiam mi desupras, en la akceptejo staras Suzanne kaj Michel, ankaŭ Gisèle kaj Robert (du esperantistaj paroj, kiujn mi renkontis en Rumanio la pasintan jaron). Mi tre ĝojas trovi tiujn amikojn sed atentu ne krokodili !

Post la vespermanĝo la ĉeforganizanto, Peter Balaš, prezentas al ni la homojn, kiuj havas apartan oficialan funkcion : dekdu instruistojn (el dek landoj), SES-organizantojn, anĝelojn (kiuj povas helpi la novulojn). Ĉiuvespere okazos la sama afero : antaŭ la vespera spektaklo, Peter donos pri la sekvanta tago la gravajn informojn, kiuj, ĉar ĉeestas komencantoj, estas tradukataj en la angla.


Hodiaŭ, ne okazos spektaklo ; por interkonatiĝi ni ludas grupe : unue, ĉiu en la grupo diras sian nomon, poste, oni dispartiĝas en du teamojn apartigitajn per koverto. Ĉiuflanke, iu alproksimiĝas kaj, kiam la koverto falas, gajnas tiu, kiu nomas la alian pli frue. Multe da ridoj ! Plie, ĉar neblas enkapigi la nomon de 250 personoj, ĉiu, dum la tuta semajno, surmetas ŝildeton kun siaj nomo, loĝlando kaj parolataj lingvoj.

La 13-an de Julio.

Frumatene, mi alproksimiĝas la programtabulon. Tre grava afero, tiu tabulo. Tie kuŝas la taga « menuo » ; horo kaj temo de diversaj distraĵoj, kiuj okazos posttagmeze kaj vespere : ekskursoj, ludoj, prelegadoj, filmoj, koncertoj, lingvaj kursoj, dancoj (ĝuste, hodiaŭ okazos kurso de hungara danco «ĉardaso», kiun mi ŝatus lerni, se mi ne aliĝus al la vizito

de la urbo), ktp.

Sed unue, laboro : esperanto-kursoj de la 9-a ĝis la 13-a. Hieraŭ, lernontoj trapasis etan teston por taksii sian nivelon. Nun, mi malkovras en kiu kurso mi estas registrita : la B2, kiun Tim Morley gvidos. Ve ! Dank'al li mi tiradis mian valizon tra la tuta urbo hieraŭ ! Ĉu li pli valoras kiel pedagogo ol kiel gvidisto ? Fakte, jes ! Li estas tre vigla instruisto, kiu rapidege parolas kun multaj mimikoj. Ĉiumatene, li komencas sian kurson per klarigoj petitaj de lernantoj pri gramatikaj punktoj. Poste, ni laboras en grupoj po 5 aŭ 6. La celo de la ekzercoj estas paroligi ĉiujn. Nia klasĉambro ne lokiĝas en la SES-ejo, sed en proksima restoracio. Ĝi estas malhela, mal-



granda kaj sonorigas la voĉojn ; feliĉe, ni ofte povas uzi la terason. Ankoraŭ sur tiu teraso ni tagmanĝas : tio estas pli agrabla ol en la SES-manĝejo

kaj kunligas la kursanojn.

Posttagmeze, ĉirkaŭ 70 homoj piediras al la urbo-centro por gvidata vizito de Nitra. La vetero estas suna kaj varma ; paŭzo en trinkejo estus bonvena. Ĝuste, la unua vizito estas je teodomo, kie ni spektas etan teoceremonion kaj trinkas kelkajn tasojn da diversaj teoj. Poste ni vizitas apudan sinagogon, kiu entenas muzeon pri la holokaŭsto de la dua mondmilito, antaŭ trairi en la urbo per eta trajno. Ni eltrajniĝas piede de la kastelo, kies fortikaĵoj ŝirmis la episkopan sidejon kaj ties palacon kaj preĝejon. Antaŭ sia statuo, ni aŭskultas la historion de Cirilo kaj Metodo, kiuj kreis la unuan alfabeton ne la cirilan sed la glagolican por skribi slavan lingvon, la slavonon.

Post la vespermanĝo, okazas la nacia vespero :

- unue, muzika spektaklo de speciala folkloro ensemblo "Rodina Hlbock." (Familio Hlbocka), en kiu sin prezentas la gepatroj, kun siaj ok infanoj (ĉi-vespere nur ses el ili),

kiuj ĉiuj kunludas kaj kantas tradiciajn slovakajn kantojn - mi tre ĝuis tion -.

- due, por agrable fini la tagon, ni gustumas lokajn vinojn el la vinproduktejo « Vino Nitra » , kiu estas fama en Slovakio.

La 14-an de Julio

La manĝejo malfermiĝas ekde la 7-a kaj duono. Mi ŝatas matenmanĝi frue, ĉar ne estas multaj homoj kaj la loko ne estas tro brua. Mi altabliĝas kun Maja, nova slovakamikino, kiu lernis tutsole esperanton per la reto kaj, ĉar ne ekzistas esperanta asocio en sia urbo, parolas la lingvon je la unua fojo. Mi miras ŝian kapablecon.

Vorto pri la manĝaĵo : samtempe ol SES, ankaŭ okazas dum tri tagoj la TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio)-kongreso. Kiam oni aliĝis al SES, oni povis elekti vegetaranajn, eĉ veganajn, aŭ viandajn manĝojn. Fakte, multaj (mi inter ili) elektis senviande manĝi pro timo de tro da viandaĵoj, ankaŭ pro la rabato proponita. Nur kelkaj estas veraj vegetaranoj. Oni devas atenti ne preni la veganajn manĝaĵojn. La unuan tagon, ne restis sufiĉe da manĝaĵo por tiuj kompatinduloj !

Dum la posttagmanĝo, mi provas eklerni la slovakon. Oni diras, ke tiu lingvo estas la esperanto el slavaj lingvoj. Kiam mi vidas, ke ekzistas pli ol dek deklinacioj por substantivoj (laŭ la genro kaj la fina litero de la vorto) en tiu « simpla » lingvo, kiaj estas la aliaj !

La vespera spektaklo estas koncerto de JoMo : varma etoso !

La 15-an de Julio

Hodiaŭ, mi vagadas piede kaj sole en Nitra por serĉi kelkajn geokaŝojn sed mi neniun



Reveninte en SES-ejo, mi partoprenas ludon « pasis la temp' ». Ni estas ok ludantoj en kvar skipoj ; samskipanoj sidas frontalfronte ĉe tablo. Ĉiuj ricevas kvin ludkartojn, kiuj portas nomon de fama esperantisto, titolon de filmo aŭ libro, nomon de muzikgrupo, ktp, kaj elektas tri inter ili ; al elektitaj kartoj, oni aldonas hazarde kelkajn aliajn. Laŭvice ĉiu ludanto ricevas la kartaron kaj disponas tri-dek sekundojn por divenigi al sia partnero kiel eble plej multajn ludkartojn, kiujn la skipo gajnos. Iom post iom, aŭskultante la klarigojn de la aliaj kaj vidante la kartojn, oni povas trovi la ĝustan respondon eĉ sen scii komence pri kio ĝi temas. La kartaro malgrandiĝas kaj fine ne plu estas kartoj. Oni kalkulas, kiom da poentoj ĉiu skipo enspezas sed ne estas la fino. Oni rekomencas la ludon per la sama kartaro sed, tiufoje, oni rajtas nur unu vorton por divenigi la respondon ! Kaj dum la tria fojo, oni ne rajtas paroli, oni devas divenigi nur per gestoj kaj mimikoj. Ridegas spektantoj kiuj grupiĝis ĉirkaŭ ni !

Feliĉe, la hazardo bone distribuis la partneroj : rango de nekleruloj ludas kun rango de multesciuloj, do la skipoj havas pli malpli samajn ŝancojn. Mia partnero estas Bertilo Wennergren, akademiano, la verkisto de la PMEG-o kaj komence mi estas sinĝena ĉar li imponas min sed laŭ la fadeno de la ludo, mi forgesas la timojn kaj ege amuziĝas.

Surprizo de tagfino : Suzanne prezentas al mi Marta, Hispanino de Barcelono, kiu dancas popolajn dancojn kaj partoprenas kiel mi en la « Granda Balo de Eŭropo ». Fakte mi memoras, ke mi jam vidis ŝin tie. Ni babilas pri tiu grava danca kunveno kaj ni akordiĝas por diri, ke la etoso en SES kaj tie tute similas. Ŝi estas pli feliĉa ol mi ĉar ŝi baldaŭ ĉeestos en « St-Gervais d'Auvergne » por danci dum mi laboros...

La 16-an de Julio

Hodiaŭ, neniun kurso sed taga ekskurso al Bratislavo aŭ Banská Štiavnica. Mi elektis ĉi tiun urbon, kies nomon mi neniam sukcesos prononci kaj kiu estas fama pro minado de metaloj (ĉefe de arĝento). Minoj estis tre

profundaj kaj estis malfacile kaj multekoste lukti kontraŭ inundoj de subteraj akvoj. Pro tio, dum la 18-a jarcento, la Viena estraro decidis fermi la minojn sed iu sperta ministro kaj inĝeniero, Jozef Karol Hell, inventis sistemon por provizi sufiĉe da malkosta energio por dreni la minojn. Per digoj oni konstruis sesdek grandajn ujojn, « tajchy », por stoki la pluvakvon kaj fanditan neĝon, kiujn kaptis 72 km da kanaloj. La tuta sistemo povis enteni 7 milionojn da m³ da akvo. Tiu akvo fluis tra kvindek sep km da kanaloj ĝis akvoradoj, kiuj funkciigas pumpilojn ekipitajn per pendola sistemo. Tiuj akvoradoj eĉ provizis sufiĉe da energio por kromaj uzadoj. Nuntempe, la rezervujoj estas belaj turismaj lagoj.



Do eku al montaro ! Post unu horo, ni elbusiĝas ĉe la enirejo de Subĉiela Minmuzeo. Komence, ni spektas etan filmon (subtitoligita en la angla), kiu klarigas kiamaniere oni minadis laŭ la epokoj. Poste, ĉiu ekipita per kasko, lampo kaj mantelo, malsupreniras en subteran galerion. Kelkfoje, ĝi estas tiel mallarĝa, ke oni povas apenaŭ paŝi, aŭ tiel malalta, ke la kapo frapiĝas kontraŭ la rokon. La atmosfero estas tre malseka, oni senĉese aŭdas glugli akvo. Kia peniga laboro.... Tio pensigas al mi pri la libro « *Germinal* ». Mi relegos ĝin, kiam mi estos hejmen. Ni ĝuas la varman sunon, kiam ni eliras antaŭ reenbusiĝi por iri tagmanĝi en restoracio de la urbo. Posttagmanĝe, estas libera tempo, kiun mi uzas por iomete viziti la urbon kaj interalie mi malkovras belegan altan kupran kamentubon, kiu staras sur tegmento de bierfarejo. Mi ankoraŭ rimarkas strangan aferon : kio ĝi estas ?



Mi malkovros poste dank'al Vikipedio la ampendserurojn, kiuj minacas faligi la Ponton de Artoj en Parizo ...

Ni finas la ekskurson en la teejo « Divná pani » (« Stranga virino »). Fakte la loko estas sufiĉe stranga kun bretoj ŝarĝitaj de libroj kaj mi ne scias, kiel priskribi ĝin (plibone vidu per vi mem ĉe http://www.divnapani.sk/index.php?id=_fotogaleria&idclanku=277) sed mi povas aserti, ke kukoj, ĉokoladoj kaj trinkaĵoj ege bongustas. Mmm...!!!

La 17-an de Julio

Eklerni tangon en slovakio de dana gvidanto. Ĉu vere ? Jes ! Ĉio eblas tie ĉi.

La vespera spektaklo estas koncerto de ĉeĥa grupo « NOPROBLEM Kostelec na Hane », ok kantistoj/muzikistoj kiuj ludas ĉefe kantojn de alia ĉeĥa grupo « Spirituál kvintet » sed ankaŭ trampan kaj "country"-muzikon. Ekde 2013 ili komencis adapti iujn kantojn al Esperanto kaj por la SES koncerto, ili ludas unuafoje sian tutan esperantan repertuaron, ĝis nun ses kantojn. Mi tre ŝatas tiun koncerton kaj krome spektantoj ricevas senpagan KD-n, kiu entenas tiujn kantojn en la esperanta kaj en la ĉeĥa. Agrabla donaco.

La 18-an de Julio

Dum kelkaj kuraĝuloj trapasas KER ekzamenojn, mi vizitas la Arboreton Mlyňany, parkon fonditan de D-ro Štefan Ambrózy-Migazzi el Hungario. Kun sia edzino, Antónia, li konstruigis kastelon apud Vieska nad Žitavou, rande



de arbaro. Ĝuste en tiu ĉi arbaro li komencis provi planti unuajn alilandajn arbospeciojn. Hodiaŭ ĝi okupas 67 hektarojn kaj ĝiaj kolek-

toj enhavas pli ol 2300 arbospeciojn el Mediteraneo, Ameriko, Afriko kaj Azio. En la jaro 1951 ĝi estis deklarita kiel protektita areo. Nuntempe ĝi estas scienca laborloko de Slovacia Akademio de Sciencoj. Kun Michel kaj Maja, mi trankvile paŝas laŭ la vojetoj. Ni ekvidas kapreolojn, kiuj rapide malaperas en la arbaron ; poste en la azia parto ni ĝuas la silenton, sidante en eta pagodo. Nur bedaŭro : tiusezone oni ne vidas florojn. Maja diras al ni, ke la Slovakoj vizitas tiun parkon prefere dum la printempo, kiam ĝi kovriĝas per multekoloraj kaj bonodoraj floroj. Sed oni estas ege malpli trankvila...

La 19-an de Julio

Jam la lasta tago por mi. Bedaŭrinde mi ne ĉeestos dum la internacia vespero, ĉar mi foriros ĵus post la tagmanĝo. Matene mi devas ĉagrene adiaŭi la novajn geamikojn, kiujn ne vizitadas mian kurson. Kaj kelkajn horojn poste, mi buse veturas al Bratislavo kun kapo plena de memoraĵoj.

Mi denove vagadas tra Bratislavo. Tiufoje, kontraŭe al mia unua frumatena vizito, la historia centro formikejas kun stratoj invaditaj de gapuloj. Subite kanona bruo altiras min sur la remparojn ; tie okazas spektaklo de dueloj kaj dancoj. Belaj kostumoj kaj timigantaj armiloj sed la dancoj mirigas min : mi rekonas anglajn kontradancojn, kiujn mi foje dancis. Tute neatenditaj !

Mi ekmalsatas ; mi ŝatus provi iujn landajn kuirspecialaĵojn, sed kiam mi vidas la entenon de teleroj, mi timas, ĉu mia stomako eltenos tiom da manĝaĵo post unu semajno de vegetara nutraĵo. Mi ne volas riski malsanon dum la morgaŭa vojaĝo, kaj mi malĝoje forlasas la restoraciojn.

Konkludo

Je la unua fojo, mi spertis veran internacian renkontiĝon kaj mi ŝategas tion. Babili pri iu ajn kun tiom da diversaj malsamlandanoj estis por mi mirinda. La semajno pasis en la daŭro de fulmo kaj mi malfacile revenis en mian kutiman mondon. Krome, tiu, kiu frapis min estas la aĝo de la organizantoj : la plej-

parto estis junaj. Ankaŭ en la partoprenantoj estis multaj junuloj. Tio fidigas min pri la estonteco de Esperanto.

Fine, jen ligiloj por spekti tri filmetojn de « Verda Stacio » kiuj temas pri SES

SES 2014 - unua tago :

<http://www.youtube.com/watch?v=XxY0eBjYt7E#t=15>

SES 2014 - vizito de Nitra :

<http://www.youtube.com/watch?v=1CQ2ZrWW86Y#t=15>

SES 2014 - nacia vespero :

<http://www.youtube.com/watch?v=1CQ2ZrWW86Y#t=15>

Hélène Alessandri

La sonorilo de la paco

Dum la ĵusa itala kongreso, en kiu partoprenis plejparte eksterlandaj samideanoj, el la variaj ekskursoj la plej interesa laŭ mi estis la vizito en Rovereto, kie sonas per falanta frapilo la plej granda sonorilo en la mondo.

Ĝi estis konceptita de Antonio Rossaro (1883-1952), armea pastro dum la dua mondmilito por memori kaj honori la Militfalintojn en la finitaj bataloj.

La ekstraordinara sonorilo estis fandita en Trento la 30an de oktobro 1924 el bronzo de kanonoj oferdonitaj de la nacioj partoprenintaj en la unua mondmilito. Ĝi altas 3,36m; ĝia diametro longas 3,21m; pezas 22,639 tunojn; ĝia ŝtiparo pezas 10,3 tunojn kaj ĝia frapilo 0,6 tunojn.

Baptita per la nomo "Maria dolens", la sonorilo havas la mantelon gravuritan per la aŭtografoj de papo Pio XII: "Nenio estas perdita per paco. Ĉio povas esti perdita per milito", kaj de la papo Johano XXIII "In pacem hominum ordinata concordia et tranquilla libertas".

Ĉiuvespere la sonorilo batsonoras centfoje por honori la Militfalintojn de ĉiuj militoj kaj por alvoki pacon kaj fratecon inter la popoloj.

Ĝia nuna laŭta admono estas:

"Tra la mondo neniam plu milito".



havas formon de balkono kaj oferas al niaj miraj okuloj, bluan, verdan de la maro, diversajn verdojn de la kamparo tra-

sulkita de vojetoj, senmorteraj muroj, dometoj dislokitaj ien ajn. Kiel faras la leterportisto por disdoni la leterojn ?

Ni transiras la montpasejon Coomakista (215 m. super la marnivelo) kaj eksoriras al Waterville, tio permesas admiri la golfeton de Baling Skellig bordatan de delikata sablo kaj malproksime oni povas ekvidi la insulojn Skellig.

Ŝarlo (komika film-artisto staras statue ĉe trotuaro, ĉiuj turistoj estas fotataj apud li. Li ofte venis ripozi ĉi tie kaj estis estimata de ĉiuj. Ni reprenas niajn rajdobestojn sub plomba suno, ni laŭiras longan strandon, paradizo de surfamatoroj. La vojo ege soras kiel altan muron, devigante nin meti la piedojn sur grundon, la sorvojo estas pli ol 27%, mi bremsas pelante la tandemon por ne retroiri tiel la vojo estas krutega, neniam ni grimpis tian vojton, plie, sunegas, ĉu vi komprenas kial, komence de mia vojaĝraporto mi skribis : « la kamiono estos utila », neniam ni scios « ĉu ni sukcesintus se ni tirintus la tandemremorkon ?



Ĉe la supro, la vidaĵo belegas, ni malkovras malproksime, la ebenaĵon, sidante sur herbo. Ni sobiras rapidege sur tobogano kiu glutas nin rapide farite, bone farite al Port Magee. Tiu vespere, neniu "midĝiz" ĉar ni ripozas en luksega junulara gastejo. Fanch (en bretona), François (en la franca) Frederiko (en Eo) kuiras por ĉiuj, kukojn kun sekaj prunoj en ĝi. Ni akvumas la manĝon per vino kiu kostas « la haŭton de...jn », la vino estas prezekstera.

Franca Cipriani

Sulmona - Italio

Daŭrigo de la tendema vizito de Irlando

La vojaĝo daŭriĝas golfeton post golfeto, la beleco kun la originaleco ĉie estas.

La enirejo de tendumejo « Caravan Park », giganta, ĉe la maro, allogas nin. Ni estas dormontoj marborde. Matene ni malkovros niajn amikojn, la « midĝiz-n », ni forkuras el la loko.

AL PORT MAGEE (la fishaveno situata en la plej uesta parto de Eŭropo)

La suno akompanas nin malkovrante la diversajn kolorojn de la kamparo, ni vagas en parketon, kie staras floroj kaj plantoj nekredblaj. La arbecaj filikoj estas gigantaj. En la parko, jen la domo de Daniel O'Connell (1775-1847) estimata kiel la « liberigulo » de la Irlanda Nacio, (tiuepoke sub la angla jugo). Ĝi estas kiel muzeo sed ĉefe kiel arbarejo por la feliĉo de botanikistojn, ĝardenistojn, ĝardenantojn. Ne ekzistas vortoj por priskribi la mirindan lokon, plie, la Golf Stream estas helpĝardenisto.

Post la gapado, ni retrovas la stratton, kiu

Judina kuracisto kunigas nin por la manĝo, konsilante al ni viziton de Insuloj Skellig. Veninte rekte de Jerusalemo, ŝia alveno ŝajnas esti pli spirita ol turista. Sankta Finiano fondis monaĥejon dediĉitan al Sankta Mikaelo. Skellig estis unu el la plej ĉefaj lokoj pro pilgrimo en Irlando.

AKROBATAĴOJ EN LA INSULO SKELLIG

Matene, ni rendevuas je la 10a sur la fiŝkajo kun nia osa « Kaptan », Brendan Casey [Kaze]. Ni prunteprenas sidlokon en lia ŝipo transformita je turismŝipo kaj ekiras por trankvila traĵo de la golfeto. La eliro sur maro iĝas movanta kaj Brendan metas la gasojn. La ŝipo skuas nin, eĉ skuegadas nin. Poste la kapitano iĝas kasisto, transdonante la stirilon al pasaĝero. Ĉe la kajo, la elŝipiĝo estas akrobata. La ŝipo jojoludas. Ni devu celi LA ĝustan ŝtupon kiu permesos retrovi la grundon. Ifoje okazas akcidentoj farante mortantojn, ĉu pro miselŝipiĝo, ĉu pro soriro de ŝtonŝtuparo.



Post suprengrimpado de 680 ŝtupojn oni malkovras la ruinojn de la eksmonaĥejo. La monaĥoj vivis klostritaj en ŝtonkabanoj en la VIa jarcento. Ili nutris sin per legomoj, kiujn ili kulturis kaj per fiŝoj kaptitaj ĉirkaŭ la insulo. Tamen la malbonaj meteorologiaj kondiĉoj en la XIIIa jarcento devigis la monaĥojn translokiĝi sur la firman grundon en Balligskelligs. La loko poste iĝis pilgrimejo.

Sur ĉi tiu insulo multe da birdoj kunvivas, fraterkuloj kun belegaj koloroj, urioj, laroj, mevoj, k.t.p... Proksime staras alia insuleto sur kiu birdoj kunvivas (sen neniu homo). La rokoj estas blankaj pro birdfekaĵo (guano). Sur la maro, la dua kolonio de suloj, ĉu flugas, ĉu naĝas, ili estas proksimume 60.000 nestantaj paroj.

La surŝipiĝo okazas tiel akrobate kiel la elŝipiĝo. Post la martransiro, apud la kajo flosas

ŝipo nomita « Le Petit Franch » (la eta Frederiko), ni demandas al fiŝkaptistoj kial, ili respondas ke tiu ŝipeto kaj ĝia nomo ne ŝanĝiĝis.

J-J Moreau

Tero anstataŭas betonon.

Traduko de artikolo elirita de la revuo "le Fil des Ans" 09 - 2014, magazino de emerituloj de konstruometioj.

La "CEMATERRE" konsistas el 3 ĉefaj kru-daj materialoj : tero, kalko, recikligitaj inertaj konsistaĵoj de betono.

Ĝi remetas la teron sur la unuan planon en la konstruado.

Malkovro de tiu nova, ekologia kaj efika materialo.

Konstrui pere de 86% el sedimentoj, rekte eliritaj ĉe la konstruejoj, eblas dank'al nova, verda materialo : la "CEMATERRE".

Por realigi ĝin, knedomaŝinoj recikligas teron, miksante ĝin kun kalko. Tiu flokiĝas* kaj sekigas la argilojn, produktante substancon rezistan al la erodo. Linaj fibroj estas aldonataj. Ili evitas kuntiriĝon kaj fendetadon. Iomete da cemento stabiligas la tuton kaj malmoligas ĝin. Akvo kaj aldonajoj kompletigas la kombinaĵon kaj ŝanĝas la produkton en paston, kiu estos verŝata en ŝelaĵojn kaj vibrata. Rezulto : la "CEMATERRE" havas kapacitojn de varm- kaj son-izolado trioble superaj al tiuj de la betono. Ĝi ankaŭ montras esceptan rezistadon al varmo kaj fajro. La tuto por samvalora prezo kiel tiu de tradiciaj konstruaĵoj.

Krom tio, ĝi ricevis en 2011 la Trofeon de novaĵo.

*Flokiĝi : fiziko-kemia procezo, dum kiu la materialoj en suspensio en likvaĵo aglomeriĝas.

Eta parto de Turanĝio en spacio

Traduko de artikolo de la loka tagĵurnalo « La Nouvelle République » de la 9a de Septembro 2014.

Portebla eĥografilo, tute telekomandita distanco, el Tura konceptado, devus iri en la in-

ternacian, spacialan stacion en 2016. Tours (Turo), devas fari sian unuan vojaĝon en spacon en 2016. Ne, oni ne orbitigas la urbon. Komprene T.O.U.R.S., por "Tele Operated UlTRasound for Space", projekto kondukita sub la egido de la Centro Nacia de Esploroj Spacialaj (CNES) pere de la fako de medicino kaj spaciala fiziologio de la hospitalo « Trousseau » de Tours.

La ekideo : ebligi la realigon de eĥografajo distance kaj eĉ distancege inter Tero kaj la internacia, spaciala stacio.

La celo estas plibonigi la esplorojn kondukitajn pri la adapto de la kardiovaskula sistemo de homo en la spaco. « La spaciala projekto bezonis eĥografilon, kiun oni kapablas regi distance, ĉar kosmonaŭto ne estas eĥografisto », rakontas Profesoro Philippe Arbeille de la fako de spaciala medicino kaj fiziologio. Li aldonas : « Ankaŭ necesas sondilo, kiun oni povas movi distance por la sama kialo : astronauĉto ne estas profesiulo de medicinbildaro ». Do, la esplorfako de Pr. Arbeille proponis antaŭ unu jaron, sistemon de tele-eĥografio, miniaturitan kaj integritan, ĉar la nunaj aparatoj estas multe tro pezaj kaj dikaj por esti uzataj en orbita stacio.

La Tura teknologia lerteco nekonata

Franca kosmonaŭto devus iri en la internacian spacialan stacion en 2016. Teorie, li havos en siaj pakaĵoj etan eĥografilon, kiu preskaŭ similas al portebla komputilo tute telekondukita distancege. Li ankaŭ kunportos, por ebligi realigon de ekzamenoj, 400g pezan sondilon, kies orientiĝo de la transduktoro (tio estas la ultrasona dissendilo), same ebligas piloti ĝin distance dank'al integritaj motoroj en la sondila korpo. Do, surtere la kuracistoj povos precizege manipuli ĝin, dank'al speco de "mantenilo". « Tio ebligas refari la movojn, fakte preskaŭ kiel farus eĥografisto se li estus apud la paciento », substrekas Pr. Arbeille.

Tiu sistemo de alta teknologio estas realigita de 5 entreprenoj, el kiuj 4 estas de Tours. La telekondukita eĥografilo estas reguligita de la Pariza Societo Sonoscanner ; la motorizita sondilo, de la entrepreno Vermon de Tours ; la sistemoj telekomandantaj la sondilmotorojn de Optimaloj de Saint-Cyr-sur-Loire* kaj fin-

fine, la laboroj de preciza mekaniko estas konfeditaj al Societoj MGM de Monts* kaj Alpha Système de Chambray-les-Tours*.

Fiereco por la Profesoro Arbeille : « Ne necesas iri al Houston ! La projekto "T.O.U.R.S." ebligis montri, ke ekzistas, en provinco, en urboj de mezamplekso kiel Tours, industria reto riĉega je etaj kaj mezaj entreprenoj de pint-teknologio. Sed tiuj niĉoj de kompetenteco ne estas tre videblaj el ekstere kaj meritus esti pli bone valorigataj internaciskale ».

La prototipo « T.O.U.R.S. » ĵus estas liverita al CNES kaj la 14an de Oktobro 2014 la Profesoro Arbeille iros al Moksvo por prezenti ĝin al la Rusoj.

*Saint-Cyr-sur-Loire, Monts, Chambray-les-Tours estas urboj ĉirkaŭ Tours.

Jeannine kaj Gérard Layseman

SOLVO DE LA KRUCENIGMO DE LA T. L 34

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
A	F	U	N	D	A	M	E	N	T	
B	E	N	E	R	G	I	O		O	P
C	S	U	M	A		A	L	I	R	I
Ĉ	T	E	A	M	O	J			D	R
D	I	N	T	E	R	N	A	C	I	A
E		A		C			L	I	G	N
F	E	S	P	E	R	A	N	T	O	
G		K	I		E	N	E	R		T
Ĝ	B	I	A	L	I	S	T	O	K	O
H	E	T		L	R	O		N	T	
Ĥ	K	A	N	Z	O	N		O	P	E

Centre Culturel Esperanto Touraine
 Halles de Tours
 Place G. Paillhou
 37000 TOURS
 Tel : 02 47 44 62 12
 esperanto-touraine37@wanadoo.fr